

Kulturaj Kajeroj

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO

Jarabono : 60 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauvinière
44300 Nantes
P.C.K. Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur pago 4)

SEPTEMBRO - OKTOBRO

1983 - 5

KULTURAJ KAJEROJ

1983 SEPTEMBRO - OKTOBRO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jean-Paul Guillot, 21, rue des Aubépines
86000 Poitiers

Komitatanoj :

Pierre Babin
Pierre Chevalier
Simone Guillot

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

El Grésillon

Esperanto tra la mondo A. Frangeul

Esperanto kaj Irano M. Challulau

Paĝo de la geknakoj A. Childs-Mee

Ĉu la homo deziras komuniki ? F. Boyet

La Mastro de Kerboja (fino)
Amromano en kamparsocia strukturo S. Boniol

Por via distro

KULTURAJ KAJEROJ ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ respondos al gramatikaj demandoj

KULTURAJ KAJEROJ prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu ai vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn.

El Grésillon

Iam alvenis en iu bieno paro kun filo. Ili intencis restadi du semajnojn aŭ iom pli por ĉeesti, almenaŭ parte, studperiodon organizitan tie. Ili sciis, ke la studperiodo komenciĝos nur post tri tagoj, sed « Ne gravas », ili havas tendon kaj certe trovos lokon ie por atendi la alvenon de la respondulo kaj la malfermon de la nova « sezono ». Intertempe ili vizitas la bienon, la arbaron, la konstruaĵojn, ekstere kaj interne.

La aŭtomobilo ne estis tre granda. Krom la tri personojn ĝi ne povis enteni multon, nur la necesajn aĵojn, nepezan tendon kaj kovrilojn. Eble ili pensis : « Ni dormos surtere ». Al kiu ne kutimas la tero estas malkomforta lito. Vizitante la eksterajn konstruaĵojn, promenante tra la koridoroj, ĉambroj kaj subtegmentejoj ili rimarkis kelkajn dikajn bonstatajn matracojn, kiuj pacience atendis uzadon. Kio traflugis la kapojn de la homoj, oni ne scias. Oni nur povas konjekti, ke venis al ili la penso « kial suferi dorsodoloron, kiam ekzistas rimedon eviti tian suferon ? ». Restas du noktoj antaŭ la malfermo de la domo. Verŝajne ili pensis, ke ili devus atendi la alvenon de la deĵorantoj kaj peti de ili permeson uzi du el tiuj matracoj en la tendo. Sed, du noktoj estas longaj por korpoj verŝajne ne alkutimiĝintaj al la kruda naturo. « Ili utilas al neniu ; ni prenu ilin kaj ni diros poste ».

Poste ili bedaŭrinde forgesis « diri ». Venis la deĵorantoj, malfermiĝis la domo, komenciĝis la komuna restado, komforte dormis la triopo. Sinsekvis prelegoj, kursoj diversaj, promenadoj. Alternis suno kaj fulmotondro akompanata de terura bruado kaj pluvofalo. Simpatia estis la etoso ; simpatia ankaŭ la triopo. Venis la tago, kiam la familio estis devigata reiri al sia lando. Tiel agrabla estis la restado al ili, ke ili atendis la lastan tempon for foriri.

Frue en la mateno iuj aŭdis bruon en la ŝtuparo supreniranta al ĉambroj kaj subtegmentejoj, bruon de translokiĝo. Tiu bruado, iom forta sed ne daŭra, ne tro maltrankviligis la okupantojn de la ĉambroj. Sed granda estis ilia surprizo, kiam ili eliris el la ĉambroj, trovi du matracojn en la koridoro. Ili provis klarigi la misteron kun la respondulo kaj sukcesis.

Intertempe la familio salutis ĉiujn aliajn ĉeestantojn kaj ankaŭ la deĵorantojn dirante, ke ili bedaŭras foriri, dankante pro la bonaj servoj ktp... sed ne parolante pri la matracoj. Kaj la forgesemuloj foriris.

Tute simpla afero. « Simpla afero de forgesemo aŭ senĝeneco » vi diras. Jes, kompreneble. Sed restas io por aldoni : la du matracoj estas tute difektitaj, ekstere kaj interne, de la pluvo kaj ne plu utiligeblaj.

Esperanto tra la Mondo

AGADO EN LA EŬROPAJ MEDIOJ...

La 4 an de majo, la Eŭropa Esperanto-Centro, en Bruselo, organizis neformalan informkoktelon en la brusela eŭropparlamenta sidejo. Venis pli ol 60 diversnaciaj eŭropaj parlamentanoj kaj oficistoj.

La kunvokinto de la kunveno estis la brita parlamentano Brian Key. Dum la diskuto, respondis interalie al la demandoj, kvar geesperantistoj kiuj laboras profesie en la Eŭropa parlamento aŭ komuna Merkato (J. Catling, B. Moon, A. Tsirimokos kaj E. Kehlet).

... KAJ INTER AFRIKANOJ

Sekve de sŭahillingvaj anoncoj aperintaj en kenia kaj tanzana gazetoj, la oficejo de U.E.A. jam ricevis pli ol ducent informpetojn. Al ĉi tiuj Afrikanoj estis sendita broŝuro en sŭahila lingvo (« Por defendo de afrikaj kulturoj ») kune kun individua letero en sama lingvo.

La ricevintoj kiuj favore reagis petante lernolibrojn, ricevis tiucele lernolibreton en sama lingvo kaj cirkulero.

La Fondaĵo Azio-Afriko de U.E.A., kiu vivas dank'al la donacoj de la esperantistoj, ebligis tiun agadon, inter aliaj.

ĈU VI KONAS TANEF ?

TANEF estas la esperanto-sekcio de la internacia turista asocio « La Naturamikoj ».

« La Naturamikoj » (franclingve : « Les Amis de la Nature »), havas pli ol 300.000 membroj, ĉefe en Eŭropo kaj posedas pli ol 750 domoj, feriohoteloj kaj montaraj kabanoj.

Estas do grave plifortigi la esperanto-fakon en tiu favora medio. Cetere TANEF jam eldonas plurfoje en la jaro, interesan ilustritan revueton : « La Migranto ».

Petu informojn, specimenon al S-ino Erna Döring, Spalenvorstadt 7, CH-4051 Basel (Svislando).

La franca delegito de TANEF estas S-ro Gilbert Lebec, 10, rue Jean-Mermoz, 94340 Joinville-le-Pont.

TANEF organizas renkontojn.

MULTAJ AMIKOJ DE ESPERANTO EN LA ĈINAJ GVIDAJ ORGANISMOJ

Dum Junio okazis en Pekino sesioj de Tutlanda Popola Kongreso de la Ĉina Popola Respubliko kaj de Tutlanda Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco. Inter la ĉeestantoj estis 46 esperantistoj aŭ « Amikoj de Esperanto ».

Pluraj esperantistoj aŭ « Amikoj » estis elektitaj inter la vicprezidantoj de la du organismoj. Krome, en la konstantaj komitatoj de ili, eniris aliaj subtenantoj de la internacia lingvo.

ESPERANTO EN LA INTERNACIA SCIENCA AKADEMIO DE SAN-MARINO

La Nacia Konsilantaro de la Respubliko San-Marino decidis starigi Internacian Sciencan Akademion por flegi la kunlaboron de universitataj kaj aliaj esploreioj diverslandaj. La akademio ĝuos la apogon de UNESCO. Krom la laborlingvoj de UNESCO kaj krom la itala kiel ŝtatlingvo san-marina, ankaŭ Esperanto estos oficiala lingvo de la Akademio.

LA ESTONTAJ MANIFESTACIOJ KAJ RENKONTOJ

En Parizo, fine de Novembro

— Studtago pri esperanto okazos en la universitato « Paris VIII-Vincennes » en Saint-Denis, la 25an de novembro 83, de la 9a30 ĝis la 20a30.

Prelegos deko da konataj esperantistaj eminentuloj. Ĉar oni provos tiel interesi pri esperanto personojn de la universitataj kaj edukaj medioj, ĉio okazos en la franca aŭ estos tradukita en la francan. La universitato disponigos sian plej grandan salonon.

Adreso : A. Le Quint, 5, place Lavoisier, a. 61, 93380 Pierrefitte.

— U.F.E.-Festivalo dum du tagoj (26-27ajn de novembro 83) en teatro (meze de Parizo, apud la famkonata « Centre Beaubourg »), oni prezentos 5 valorajn spektaklojn : artistoj de pluraj landoj (8 kanzonistoj, 2 teatrotrupoj kaj kabaredteamo ĝis nun anoncitaj.

Adreso : U.F.E.-Festivalo, 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004 Paris.

— 27a Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo (27-12-83 - 3-1-84), en Niendorf (D) ĉe Balta Maro. Temo : « La libera homo kaj 1984 », pro la sciencfikcia romano de George Orwell titolita « 1984 ».

Adreso : Germana Esperanto-Junularo, Postfach 10 13 22, D-2000 Hamburg 1.

— 65a Universala Kongreso : Vancouver (Kanado), 21a-28a de julio 84. Adreso : L.K.K. de la kongreso de esperanto, North Boundary Vancouver, B.C. Kanado V5K 3S4.

Antaŭkongreso en Montreal, 14a-20a de julio. Esperanto-Societo Kebekia (Z) d : Louise Labelle, 10617 Oscar, Montreal, Quebec, Canada HIH 5J8.

— 40a Internacia Junulara Kongreso, en Swanwich, Britio, 13a-20a de julio. Adreso : Esperanto-Centro, 140, Holland Park Avenue, London, Britio, W 11 4 UF.

TRE RIĈA PROGRAMO EN POLLANDO

La Buroo de Esperanto-Turismo « Esperantotur », str. M. Sklodowskiej - Curie 10, PL 85-094 Bydgoszcz, Pollando, povas sendi al vi la programon autaŭvidatan por 1984 : internaciaj buslinioj « Esperanto », konstantaj internaciaj esperanto-lernejoj en Bydgoszcz kaj Torun, renkontoj diversaj, k.t.p.

KOORDINATA AGADO EN AŬSTRALIO

En junio, pluraj organizaĵoj kunvenis en Kanbero, por inaŭguri laborgrupon favoran al esperanto. Temis pri Aŭstralia Esperanto-Asocio (kiu kandidatiĝas por la universala kongreso en 1988), Asocio por Unuiĝintaj Nacioj, Federacio de Asocioj de Instruistoj de Modernaj Lingvoj, Virina Kristana Organizaĵo por Abstinemo kaj Societo de Amikoj (Kvakeroj).

Starigo de laborgrupo por diversaj objektivoj, estis decidita.

Esperanto Kaj Irano

Karaj Samideanoj, mi tutkore saluas Vin kaj bondeziras al vi ĉiuj bonan daŭrigon de nia kongreso. Bonan vi certe pridubos aŭdante mian paroladon kaj mi bone scias ke nur en dormo vekiĝas la apetito. Sed nun dorno ! Jes dornoj por vi kaj por mi ! Mi elektis kiel temon Esperanto kaj Irano. Pri kaj plu pensinte tion mi alfrontis multajn novajn problemojn tute ne solveblajn. Do mi prezentas al vi nur skemon entenantan pli da demandoj ol da respondoj.

Mi iomete interesiĝis pri Irano dum la tiel nomata islama revolucio, precipe ĉar Irano estis por mi ekzemplo de nova kolonio aŭ pli krude estas bildo de tio, kio nomiĝas Okcidento aŭ « libera mondo ». Irano estis eflektive lando politike sendependa laŭ onidiroj sed fakte ne, ĝi estis tute dependa de Okcidento, precipe de Usono en la lastaj jaroj. Mi konfesas ke mi admiris tiun popolon, kiu forigis imperialistojn, detruis hegemonion, renversis plej kruelan reĝimon, provis krei veran sendependecon, veran nacian senton, fieron.

Sed mi tuj aldonas, ke mi elreviĝis tre rapide. La nova reĝimo pli fias ol la antaŭa. Ankoraŭ bela revo forfluganta ! Kaj kiel Esperantisto mi sekvis atente sed iom atende la grandajn eventojn rilate Esperanton en Irano. Jes ĉu finfine la orienta pordego malfermiĝas por ni ? kiel titolis la revuo Esperanto. Kaj ĉu vere Irano donas al la esperanta movado lecionon, la tiel nomata « Irana leciono » ? Pasis la jaroj kaj nun kuŝas en tiu leciono pli da problemoj ol antaŭvidite. Eble la ĉefa leciono el Irano estas : ni devas disvastigi Esperanton ĉiumaniere, pere de ĉiuj rimedoj, pere eĉ de partioj aŭ religioj. Sed ĉu leciono ? Ĉu ni, Esperantistoj, ne plu legas la verkojn de Zamenhof, ĉu ne liaj tiuj versoj :

Ni semas kaj semas, neniam laciĝas
Pri l'tempoj estontaj pensante.
Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas
Ni semas kaj semas konstante.

Ĉu ni ĉiuj ne konas tiujn versojn, kiuj fariĝis jam proverbo :

Eĉ guto malgranda, konstante frapante
Traboras la monton granitan.

Do ververe tute ne ekzistas irana leciono tiupunkte.

Estas vere ke la esperantistoj ĝuas ĝoion je tiuj novaĵoj : miloj kaj miloj da homoj lernas, aŭdas, legas pri Esperanto en jen universitatoj, jen gazetoj kaj tiel plu. Iom infanece ! El tiuj miloj da interesitoj kiom da aktivuloj, kiom da verkistoj, tradukistoj, gazetistoj ? Nur la estonto donos respondon sed historio de nia movado ne tro igas min optimisto. Sufiĉas infanaĝi, nepras homi kaj tuj la problemoj kaptas nin.

La kerna problemo estas ĉu la esperanta movado devas urĝe revizii sian laborplanon kaj kontentigi la bezonojn de la tiel nomata Tria Mondo kies Irano eras (estas ero).

Por mi, Okcidentano, sufiĉe riĉa por manĝi sate, dormi senprobleme, labori kun plezuro — jes — estas tre malfacile paroli pri tio. Kiuj estas la bezonoj de la Tria Mondo, de Irano ? Irananoj petas de ni lernolibrojn pri sociaj sciencoj kaj poste pri studoj matematikaj, teknikaj. Aŭ pli simple « ni bezonas lerni por akiri scion, la teknikan scion de la moderna mondo ».

Bone mi parolos pli funde pri tio poste, sed mi eĝe bedaŭras ke oni prezentas Esperanton kiel solvon de tiu problemo, kiam ne ekzistas solvo !

Aŭ pli klare oni ne devas misprezenti Esperanton. Tiuj miloj da Irananoj baldaŭ senreviĝos ĉar ne ekzistas en Esperanto tiu faka literaturo teknika kaj scienca. Ĉu ni kulpas pri tio ? Tute ne ! Kulpas tiu, kiu deklaris ke Esperanto povas servi por akiri sciencon kaj teknikon ! Do miavidpunkte : propagandi Esperanton, bone, mensogi, ne ! Ni devas fieri pri nia mizero sed ne aroganti. Ni devas diri veron, nur veron ! Nia nuntempa movado estas nenio en la mondo establita. Jes. Sed ĉar ĝi estas nenio, ĝi estas ĉio. Memoru tiujn Zamenhofajn vortojn : « Afero bona kaj certa progresas ordinare malrapide kaj kun grandaj malhelpoj ». Kaj Zamenhof antaŭvidis : « nenia homo, nenia societo esperantista en tro granda sed ne prudenta fervoro, kiu faris ian malveran paŝon povas havi ian influon sur la sorto de la Esperanto afero » ĉar memoru kun li : ke nia afero *neniam mortos* ĉar ĝi morti neniam povas ».

Ŝajnas al mi ke la Irana Esperanto movado estas malvera paŝo, ne prudenta. Sed ne gravas se oni sukcesos eltiri lecionon de tiu « irana leciono ».

La fundamenta problemo por la esperanta movado nuntempe estas ĉu doni la unuan lokon al scienco kaj tekniko. Sed ĉu oni scias kio estas scienco, kio tekniko ? Ĉu transloki teknologion estas peto de la tria mondo aŭ altrudo de l'Okcidento ? Ĉu avido scii sciencon estas avido koni metodojn de la scienco aŭ nur rezultojn ? Ĉu deziro scii teknikon estas deziro plibonigi la nivelon sanan, edukan de la popolo aŭ nur ricevi manierojn uzi pafiloin ?

Mi estas tute naiva sed kiam en mil naŭcent sep dek ok Irano aĉetis armilojn je la kosto de *kvin miliardoj* da dolaroj ? Do dum unu jaro Irano pagis por *dek-kvar* iaroj da lernado de fremdaj lingvoj (por tri milionoj da infanoj) (Nouvel Observateur, 10 avril 1978 - Esperanto Januaro 1978/5).

Mi estas freneze naiva sed kiam mi scias ke *kvar miliardoj* da dolaroj estis elspezitaj por konstrui la plej grandan bordelon — Jes amorejon — de l'mondo (kiu deziras la adreson ? : insulo Kiŝ), persa golfo — nur tiuj, kiuj alvenas per aviadilo « Concorde » povas amori (Nouvel Observateur, 20 novembre 1978). Mi petas la iranain esperantistoin ne tro krii « help ! help ! » al la okcidentaj esperantistoj. Vere oni ne povas imagi kiom da libroj esperantaj oni povas eldoni pere de tiuj sumoj. Aŭ pli simple oni povas, ĉar Esperanto, estas kvinoble pli facile lernebla ol la angla — se ne dekoble — do oni povas instrui Esperanton al ĉiuj Iranaj homoj dum cent jaroj. Sed oni preferas fiki ol faki.

Kaj nun Irano militas. Evidente kiam oni aĉetas armilojn oni devas uzi ilin kontraŭ iu ajn. Nian senpagan bombon revolucian, jes nian Esperanton kun ĝia mesaĝo : frateco de la popoloj, ni ne vendas tiel altpreze ! Eble estas pro tio ke oni ne volas de nia Esperanto ! Ĉu Irano deziras teknikon nur por militi ? Pli krude subpreni oponantoin ? Ĉu ĝi forgesis la mesaĝon el Korano « ne altrudu ion al iu ? ».

Ĉu ni esperantistoj devas liveri manlibrojn pri la arto militi, la arto torturi ? Nun milito, torturo estas sciencoj kaj eĉ pli bone ellaboritaj ol la aliaj !

Mi troigas sed la problemo ekstaras : kion eldoni ? Je kia nivelo ? Mezlerneja, altlerneja ? Por kiu ? Por kiuj ?

Tie estas alia problemo : sciencon kaj teknologion (scienco de la teknikoj) ni lernas dum dek jaroj. Ĉu dum tiuj dek jaroj la instruado estas en Esperanto aŭ en la nacia lingvo (en Irano la persa, en Ĉinio la ĉina, kaj tiel plu). Ĉu oni lernas sciencon nur legante librojn ? Ne. La plej bona maniero lerni sciencon estas instrui ĝin, do paroli, priskribi, diskuti, klarigi. En kiu lingvo ? La lingvo de la libroj, do, se nur Esperanto, en Esperanto. Tiam la iranaj sciencistoj parolas esperanton, en siaj fakoj sed kiel ili transdonos siain konoin. Al ĉiuj aliaj ? Esperanto devas ludi rolon nur internacian, intergentan, interpopolan aŭ Esperanto ludas la saman rolon kiel la

angla. Principe Esperanto estas lingvo por ĉiuj, tiu-kaze se Esperanto servus nur por akiro de scienco kaj tekniko, ĝi servus nur al elito ĉar sciencistoj - teknikistoj estas maksimume unu procento de la popolo. Aliro al scienco nuntempe estas aliro al elito — vole nevole — kaj nuntempe la angla estas lingvo de tiu elito nur pro la potenco de Usono (se morgaŭ ĉinio produktas milionojn da matematikaj teoremoj, teknikaj patentoj, sciencaj eltrovoj, la sciencistoj lernos la ĉinan). Ĉu ni Esperantistoj deziras ke Esperanto estu la lingvo de tiu elito ? Tiam mi relegas tion, kion verkis Zamenhof « Ni havus sekve ne lingvon internacian en la vera senco de tiu ĉi vorto sed nur lingvon internacian por la *pli altaj klasoj de la societo* ».

Atentu bone : mi tute ne deziras ke Esperanto ne servu al komunikado, eĉ instruado de sciencoj kaj teknikoj, male mi pretas tion fari. Tamen estas risko ke se Esperanto servas *nur* por scienco kaj tekniko, ĝi iĝas elita lingvo.

Tiu-punkte mi kredas ke la rolo de la esperantistoj estas pripensi sciencon kaj teknologion. Anstataŭ verki sciencajn lernolibrojn, pli bone estus verki pri scienco ĝenerale, pri la metodoj sciencaj, pri la rilatoj inter scienco kaj sociopolitikaj problemoj. Devus esti la historio de la scienco, kiu elstarigas la fakton ke scienco evoluas, ŝanĝiĝas, ke ĉiuj nacioj, civilizacioj alportis ion, alportas ion. Kaj precipe ke scienco ne donas respondon al ĉiuj demandoj. Scienco ne estas panaceo, eĉ se ĝi estas la necesa kondiĉo por trovi panaceon se tiu ekzistas !

Ni Esperantistoj devas bone kompreni nian revolucian mesaĝon kaj ne forgesi ĝin. Ĉu Esperanto devas esti la lingvo de la multnaciaj entreprenoj ? Ni devus pli funde analizi la problemojn — mi mem estas terure timigita de tiuj tiel grandaj problemoj sen solvoj — ekzemple post cent jaroj naŭdek procentoj de la tutmonda homaro konsistos el popoloj de la Tria Mondo. Ni riĉuloj nunaj estos dek procentoj ! Kaj nuntempe nur ni riĉuloj posedas sciencon kaj teknologion altgradajn.

Oni deziras akiri tion ĉar veras ke scienco kaj teknologio alportas multon sed ekzistas aliaj kaŭzoj de la sukceso de Okcidento : ekonomiaj kaŭzoj pere de koloniismo kaj novkoloniismo. Okcidento posedis, posedas la riĉfontoin de la mondo. (Tie-ĉi mi devas diri ke la scienco tute ne neŭtralas kiam ekzemple aviadiloj usonaj — aŭ sovetaj (Soveta Unio kolonias ankaŭ) malkovras novain kampojn de ercoj, oni sekretas tion) — sekreto ! Jes tiam oni pensas pri politiko kaj fakte estas ankaŭ politika kaŭzo : la burĝara demokratio favoris kapitalismon, kiu kreskis pere de teknikoj kaj sciencoj. Ĉu mi devas aldoni ankaŭ religian kaŭzon ? Eble jes.

Fakte la sukceso de Okcidento estas rezulto de multaj fortoj, Okcidento estas sistemo en kiu ĉio interrilatiĝas, eĉ la fama diferenco, kiun mi uzis inter scienco kaj tekniko, ne plu ekzistas.

Pensu pri atomenergio ! Tiu-kampo la plej fundamentaj konoj pri atomo, tiuj konoj kiui necesigas tre ellaboritan matematikan teorion, tiuj fundamentai konoi restus nur konoj por kelkaj homoj se ne ekzistus atomcentraloj, kiui estas frukto de la nura teknologio. Komputilo estas matematika ludo sed nun kai baldaŭ, ĉiui komputilos eĉ se ne necese ! Tial ludas la forto de modo, de snobismo, kaj precipe tiuj, kiui produktas devas vendi !

Mi ne tro volas paroli pri la ligoj inter armeoj, militistoj kaj scienco sed la ligoj estas tiel fortai, potencai — eĉ en niai tiel nomataj purai matematikoj — ke mi dubas pri la neŭtraleco de scienco kai teknologio kai matematikoj ! kaj de Esperanto se ĝi servus *nur* al scienco.

Kion do fakte la tria mondo bezonas ? Mi tute ne scias ! Kaj mi ne volas imagi ĉar mi certe eraros ! Eble pere de Esperanto oni povas funde koni la bezonoin, kaj malantaŭ tiuj bezonoj la kialojn ? kaj la kielojn.

En Okcidento multaj homoj juĝas malfavore sciencon, ekzistas kontraŭstaro al teknologio pli kaj pli potenca. Oni aŭdas nun pli pri la kvalito de la vivo ol pri la kvanto — kaj kvanto estas la esenco de scienco — almenaŭ de kelkaj fakoj de scienco — kvalito estas esenco de etiko, filozofio, religio.

Nun kelkaj eĉ proklamas : « Okcidento Akcidento ». Aliaj vortas : « Atomenergio, ne, dankon ». Kelkaj ŝercas : « Dolaroj, doloroj », « Matematiko ne, maten-mamtiklo jes », aliaj vortludas « Civilizo, sifiliso » (kial ne ?). En Okcidento scienco ne venkis, la racia aliro al priskribo de fenomeno, fondita sur eksperimentado kaj teoriado estas tute fremda al ĉiuj homoj eĉ en nia « scienca » Okcidento. En niaj riĉaj landoj ĉiu povas akiri sciencan spiriton sed sufiĉas aŭdi kritikojn kontraŭ Esperanto por kompreni ke la scienca sinteno ne estas natura sinteno, ĝi estiĝas nur post longaj jaroj.

Kiu el ni scias kiel funkcias transistoro ? Mi konfesas ke ne, kaj tute ne science kiam mia radio-ricevilo malbone funkcias mi pugnobatas ĝin ! Sen rezulto !

Kiu el Vi neniam legis horoskopon ? Ĉu homoj el la Tria Mondo pli bone komprenas sciencon ? Mi dubas.

Malplaĉas al mi paroli pri mia profesio sed hodiaŭ mi devas diri ke mi instruas al Tria Mondanoj depost dek jaroj matematikojn sen pli da sukcesoj ol al francoj. Evidente la lingvaj baroj ekzistas sed inter francoj tute ne ! Kaj la rezultoj estas ege malbonaj. Ĉu esperanto povas faciligi komprenon de matematikoj ? Mi forte dubas ! Mi ree demandas : en kiu lingvo instrui matematikon al Irananoj ? Ĉu perse ? ĉu angle ? ĉu esperante ? Tutcerte mi diras : perslingve. Evidente se mi deziras paroli pri matematiko kun Iranano mi alparolus lin esperantlingve. Do mi rekomendas : instruado de scienco en la nacia lingvo, komunikado internacia pere de Esperanto. Tamen ankoraŭ problemo : kio estas nacia lingvo ? Ankoraŭ politiko, ekonomio, scienco, rilatas !

La Esperanto movado estas ligita al nenia politika partio, al nenia ekonomia sistemo. Estas fakte do ekster la mondo kaj do ekster la scienco. La nuna esperanta movado povas nenion alporti al la Tria Mondo, nur diri : Esperanto ekzistas. Vi povas utiligi ĝin. Uzu ĝin, plibonigu ĝin, universaligu ĝin. Esperanto estas neniesa lingvo do ĉiesa. La esperanta movado povas nur deklari : al Okcidentano kiel al Tria mondano kaj precipe al iranano : nur vian personan aktivan partoprenon ĝi bezonas. Ĉiu alportas ion, sed ne demandu tion, kio ne ekzistas kaj memoru bone : scienco kaj tekniko estas mortaj, Esperanto senmorta.

Michel CHALLULAU.

ALVOKO

Jam de 13 jaroj, mi rolas kiel « redakcia sekretario » de la revuo « Kulturaj Kajeroj ». Tiu longa tempo signifas, krom sufiĉe multe da laboro por mi, rutinon sterilan en la vivo de tiu revuo. « Kulturaj Kajeroj » nepre bezonas « freŝan sangon » por ke ĝia aspekto kaj enhavo moderniĝu kaj fariĝu pli allogaj.

Fakte, la laboro ne estas malfacila. La redakcia sekretario nur elektas artikolojn laŭ diverseco kaj longeco. Li ankaŭ povas instigi kunlaboradojn pri temoj aktualaj aŭ novaj. Resume, la aspekto kaj enhavo de la revuo estas tute sub la respondeco de la redakcia sekretario kiu estas tute libera en sia laboro.

Mia demando estas do : *Kiu bonvolus surpreni la taskon de redakcia sekretario de « Kulturaj Kajeroj » ?* Mi aldonas ke, de via respondo, dependas la vivo aŭ la morto de la revuo, ĉar mi vere ne plu povos plenumi tiun taskon.

La redakcia sekretario,
Jean-Paul GUILLOT.

Paĝo de la geknaboj

Tricky **la falanĝero**


[**Tricky** (elparolu : triki) signifias 'petolema']

Ni daŭrigas nian promenadon en la mallumo. De branĉo de arbo super ni venas delikata tuso. « Ho ! » mi diras. « Mia amiko **Tricky** ». Mi diras : « Venu, do ! Mi havas pomon por vi ». El mia poŝo mi prenas pomon kaj detranĉas pecon. Per nia poŝ-lampo ni vidas du ruĝajn okulojn super ni. Mi etendas la pom-pecon. Tuj falas besto samgranda kiel kato. Tamen li ne falas al la tero. Ni vidas, ke li pendas per sia vosto de branĉeto kaj per du malgrandaj rozkoloraj manoj, prenas la pom-pecon. Li tuj, per ambaŭ manoj, metas tion en sian buŝon kaj etendas la manojn por pli. Mi donas al li la tutan pomon. Ankoraŭ pendanta per la vosto li formanĝas la tutan pomon. Kiam li estas certa, ke mi ne donos al li duan pomon, li prenas sian voston per siaj manoj, kaj grimpas, manon super mano, ĝis la branĉeto. Li vere surgrimpas sian propan voston por reatingi la branĉon. Tiam li denove tusetas ; kredeble tio estas « Dankon ! ». Tiam li grimpas al truo en la trunko de la arbo, rigardas nin per du ruĝaj okuloj, fermas la okulojn kaj endormiĝas.

Kiam mi estis infano, antaŭ multaj, multaj jaroj, tia arĝent-griza falanĝero estis, dum pluraj jaroj, amiko mia. Kiam li aŭdis min en la arbaro, li malsupreniris al branĉeto super la pied-vojo kaj tie atendis min, ĉar, kiel li bone sciis, mi ĉiam portis por li pomon. La scienca nomo por tiuj bestoj estas **Trichosurus vulpecula,** kiu signifas « Har-vostulo kun vulpo-simila vizaĝo ». Ili havas tre belan mol-haran grizan pelton, kaj tio estas por ili danĝera, ĉar la homoj ŝatas porti vestaĵojn faritajn el tiuj peltoj. Kvankam la aŭstralia leĝo malpermesas ĉasadon de falanĝeroj, kelkaj malhonestaj homoj pretas pagi grandajn mon-sumojn por la peltoj, pro kio aliaj malhonestaj homoj daŭre ĉasadas kaj mortigas, nur por mono, multajn el tiuj amindaj bestetoj.

Ĝis revido, kiam ni denove daŭrigos nian promenadon en la mallumo.

Onklo Wre el Aŭstralio.



Ĉu la homo deziras komuniki ?

Por respondi klare al tia demando, unue necesas sufiĉe precize difini la agon komuniki. Nun oni multe substrekas la rimedojn de la komunikado, oni emfazas la teknikajn progresojn, tio ne estas la celo de mia serĉo. Mi difinos la komunikadon per la sendo de mesaĝo, de unu sendinto al iu ricevonto, kun la intenco trafi tiun ricevanton, kiu post la ricevo montros konsekvencon : ĉu per ago ĉu per respondo, ĉu per reciproka demando... k.t.p. Mi akcentas tiun difinon, ĉar laŭ mi, la limo pri kiu mi zorgos kuŝas inter la komunikado supre difinita, kaj la simpla sinesprimo, per kiu elsendanto ĵetas mesaĝon al la universo, sed sen atento pri la eventualaj ricevontoj.

Antaŭ ol eniri la demandojn pri la enhavo de la mesaĝo, la psika stato de la esprimanto, mi deziras montri per ĉiutaga ekzemplo, kial mi dubas pri la komunikemo de la homoj. Kiam homoj ariĝas sen preciza celo, kiam ili komune atendas ion, pro ĝentileco naskiĝas inter la homoj iu specialaĵo, kiun oni nomas « konversacio ». La esperantistoj bone scias, ĉar oni tion ripetadas ĉie, ke nur per konversacioj oni povas lerni la praktikon de la lingvo... kaj oni ofte baraktas por, ne tro artefarite, instigi konversacion. Sed ni aŭskultu, kion oni diras en spontanea konversacio. Iam temas pri la vetero, sed la temo rapide elĉerpiĝas, kaj iom post iom iu rakontas anekdoton pri sia vivo. Ne ĉiam sed ofte, la aliaj nur preteraŭskultas, kaj se ekzemple temas pri malsano, la pseŭdaj aŭskultantoj fakte pensas pri sia propra malsano kaj atendas pli malpli pacience la okazon rakonti sian malsanon : ĉar por ĉiu el ili la propra malsano estas la plej interesa. Oni rimarkas la saman sintenon pri akcidentoj, administraj malfacilaĵoj... okazas konkurenco inter la rakontoj, ĉiu deziras sin esprimi, sed ne tre interesiĝas pri la alia. Ĉu tio estas komunikado ?

Kial estas malfacile komuniki ? La baroj estas multaj, iuj kuŝas en la aparteco de la mesaĝo, aliaj en la psikaj bremsoj de la homo, fine la sociaj grupoj eventuale povas ĝeni la interkomunikadon.

Se oni unue atentas pri la enhavo de la mesaĝo, oni tuj povas distingi la kazoin. kiam la kontrolo de tiu komunikado estas preskaŭ neebla. En tiu kazo, la sendinto de la mesaĝo povas registri respondon de la ricevintoj, sed ĉu tiuj respondoj pruvas la efikecon de tiu komunikado ? Mi nun pensas pri la nelingvaj artoj. La sendinto produktis verkon kaj montris ĝin (povas esti pentraĵo, kiun oni rigardis, aŭ simfonio, kiun oni aŭskultis) ; ordinare, se tiu prezentaĵo estas publika, pro ĝentileco la ricevintoj aprobas (ekzemple per aplaŭdoj), sed ĉu tiu aprobo pruvas, ke la mesaĝo estis ricevita ? Cetere, en la historio de la arto, estis diversaj periodoj. Iam oni asertas, ke la artisto « laboras por la popolo » kaj tiam oni devas aserti, prave aŭ malprave, ke la mesaĝo portis la kulturon al la popolo, sed en aliaj periodoj, oni emfazis pri la izoleco de la artisto, kiu despli fieras, kiam neniu povas ĝin kompreni. En tiu lasta kazo, temas pri sinesprimo, sed ne pri komunikado.

Estas interese sin demandi speciale pri poezio, ĉar ĝi estas kvazaŭ limo inter la artoj nelingvaj, kaj la aliaj komunikaĵoj, kiuj esprimiĝas per lingvo. Pri la poezio, speciale en Esperanto, mi konstatis rekte tion, kion ankaŭ W. Aŭld substrekas : « de la komenco de la lingvo, multaj estis la « poetoj » (kiuj sin esprimis per poemoj) », sed kiam oni studas la vendojn en libro-servo, oni konstatas, ke la legantoj ne multas. Kaj nacilingve, ĉu vi ne konas aŭtorojn, kiuj publikigas libretojn, kiujn aĉetas nur « kolegoj », kiuj esperas reciproki. Antaŭ nelonge, mi legis verkon de Waringhien, kie ĉi tiu aŭtoro parolas pri sia amikeco kun Kalocsay. Ŝajnas fakte, ke tiuj du poetoj komunikis... sed ili estis du. Mi ne intencas diri, ke neniam povas esti komunikado per poezio, sed mi supozas verŝajna la ĝeneralan deziron sin esprimi, sed ankaŭ malofta la efikecon de tiu esprimo. Cetere iuj poetoj diras, ke ilia rolo estas krei novajn lingvaĵojn, kaj W. Aŭld multe emfazis pri tia efiko de la poezio en Esperanto. Tiam oni rajtas kredi, ke multaj ne deziras legi lingvon, kiun ili ne komprenas, kaj krome, ke inter la legantoj ne malmultaj estas tiuj, kiuj misricevis la mesaĝon (sed tamen pro snobismo uzas poste, pli malpli trafe, la « novan lingvon »). Kiu povus mezuri la efikecon de la komunikado en tia medio ?

Nun ni flankenlasu la cirkonstancoin, kiam la homo precipe deziras esprimi profundajn sentojn per ĵuskreita lingvo, por studi tion, kio okazas, kiam la homoj provas efike interrilati, tio estas komuniki. Denove oni renkontas malfacilaĵojn, kiuj kuŝas en la multlingveco tradicie inter naciaj lingvoj, sed pli moderne inter la fakaj lingvoj. Mi ne bezonas detale studi antaŭ esperantistoj tion, kio estas la sintenado de la homoj, kiuj deziras trudi al aliaj sian propran lingvon. Franca humuristo diris : « kiam vi iras al Anglujo, aplombe parolu nur france, eĉ se vi konas la anglan lingvon, tiel estos la alia, kaj ne vi, kiu baraktos en malfacilaĵoj ». En tia imperiisma situacio, la sendanto de mesaĝo celas ja efikecon, tio estas, ke la alia obeu eĉ ne tute klare kompreninte, tiel la koloniintoj trudis la eŭropajn lingvojn al Afriko ekzemple. Laŭ mi, tia kripla esprimo ne estas vera komunikado. Sed ni supozu solvita la problemon de la naciaj lingvoj, ekzemple per Esperanto, ĉu tio sufiĉas por

permesi la komunikadon ? Tute ne. La baroj denove multas ; ekzistas baroj je la nivelo de la esprimo, kiam la temo de la komunikado estas bazita sur propra sperto. La sendanto de la mesaĝo sin esprimas, la paroloj, por ĝi estas klaraj, sed por la aŭskustanto, kiu ne travivis la samajn spertojn, ili restas pli malpli nebulaj. Tre ofte, en diversaj konversacioj, oni diras : « pro neŭtraleco, ni neniam parolos pri religio aŭ politiko ». Kompreneble, mi nun ne aludas la neŭtralajn organizaĵojn, kies reprezentantoj ne rajtas prezenti siajn proprajn opiniojn kiel tiujn de la asocio. Mi pensas nur pri tute liberaj individuoj en demokrata reĝimo, kie ĉiu rajtas diri ĉion, kion ĝi pensas. La sperto montras, ke ofte, pri tiaj temoj eksplodas kvereloj ; parte tio kuŝas en la fakto, ke por kredanto iu valoro ligiĝas al iuj esprimoj, kiuj por alikredanto havas tute malsimilan efekton. Laŭ mi, oni povas ĝeneraligi la problemon, ĉar ĉiuj kredoj, ne nur religiaj aŭ politikaj, fontas el kutimoj, kies radikoj enprofundiĝas en ĉiu aparta individua spertado, kaj pro tiu aparteco, al la laŭvorta mesaĝo, aldoniĝas nekomunikebla etoso, kaj la komunika valoro de tiu mesaĝo malkreskas. Mi foje provis meti limon inter objektivaj kaj subjektivaj lingvaĵoj, kaj iuj forte riproĉis min pri tio. Tamen mi kredas, ke laŭ la temo elektita por komunikado, ju pli la mesaĝo entenas personajn neesprimitajn influojn (tion mi nomis subjektivaĵoj), despli la komunikado estas malfacila. La celo de « objektiveco » estas ĝuste meti en mesaĝon nur tion, kio estas en la priparolata objekto, sen kaŝita influo de la sendanto de mesaĝo. Kompreneble, tio estas nur celo, kaj same kiel nenio estas perfekta, ĉiu mesaĝo entenas iom da influo de la « sujekto », tio estas la persono, kiu sendas la mesaĝon. Por taksi tiun influon sufiĉas zorgi pri la terminaroj, eĉ matematikaj (tie devus regi objektiveco) kaj oni konstatas, ke laŭ la lokoj, la tempo, iu termino signas iun objekton, aŭ alian. Tia situacio klarigas la neceson de internaciaj konferencoj pri « normigo » de la sciencaj terminoj ; oni starigas normojn, sed krom la sociaj influoj, pri kiuj mi parolos poste, oni ankaŭ devas zorgi pri la evoluo de la konoj, la novaj bezonoj, la novaj proponoj... kaj starigi novajn konferencojn. Konklude, eĉ kiam la homoj elektas temojn, kie la personaj pasioj devus muti, kiam ili konsentis pri terminaro, tamen oni ne estas certa ĉu la komunikado estos tute bona. Oni ne forgesu, ke eĉ en la aŭtomata komunikado, oni ofte bezonas kontroli, ĉu la informado konserviĝas.

Pro tiuj malfacilaĵoj, por sufiĉe bone komuniki, oni nepre devas ege deziri tiun komunikadon, sed ĉu tio estas ordinara sinteno ? La psikologoj instruas al ĉiuj instruistoj, ke kiam ili estas kvarjaraj la infanoj kutimas praktiki la kolektivan monologon. Tio signifas, ke en grupo de tiaj infanoj, iu rakontas, sin esprimas, sed la aliaj tute ne aŭskultas, ili ŝajne respondas, sed fakte rakontas sian propran esprimon. La fakuloj klarigas tion per la evoluo de la infana psika kapablo, oni ne povas esperi spontanean dialogon je tiu aĝo. Por la instruistoj, kies lernantoj estas iom pli maljunaj, la celo estas alkutimigi la infanojn al aŭskulto de la aliaj, tion oni nomas sociigo de la infanoj. Kiam oni komparas tion al miaj elvokoj de la komenco, oni povas konkludi, ke multfoje la plenkreskuloj kondutas kiel infanoj. Eble, oni povas diri, ke aŭskulti la aliajn kun la deziro bone kompreni iliajn problemojn estas peniga laboro, kaj pro tio, kiam homoj babilas kun la celo sin distri, ili sekvas la facilan modelon de la junaj infanoj. Tio jam povas esti klarigo. Oni ankaŭ povas rimarki, ke la ricevo de mesaĝo estas ne nur peniga, ĉar oni devas retropuŝi la tendencon pensi pri si, sed krome tiu sinteno estas malfacila, precipe kiam oni ne bone konas la personecon de la sendinto. Oni povas kompari tiun tujan bezonon al la zorgo de la historiistoj, kiuj devas « kritiki » la fontojn de la dokumentoj. Oni ankaŭ povas kompari tiun malfacilan sintenon al tiu de juĝisto, kiu aŭskultas diversajn atestantojn, kiuj sin kontraŭdiras. Estas malfacile eltrovi la veron, kiam oni disponas pri longa tempo, multaj dokumentoj aŭ pluraj enketoj ; kiam temas pri tuja kompreno de persono, kiu rekte alparolas vin, estas ankoraŭ pli malfacile, kaj oni povas indulgi al la supraĵaj aŭskultantoj. Sed ni devas esti justaj, kaj ne nur la ricevanton kulpigi ; ĉu la sendinto sufiĉe pensis pri la aŭdantaro ? Denove estas interese kompari kun la junaj infanoj, kiuj tute ne zorgas pri la atento, kaj la atendo de la aliaj. Komuniki ne estas simple sendi la mesaĝon, kiun oni deziras, estas ankaŭ konstrui tiun mesaĝon por ke ĝi trafu la aŭskultantojn ; denove temas pri peniga laboro, pli facilas paroli por si ol por la aliaj. Resume, por komuniki kaj la sendanto kaj la ricevanto devas atenti pri la alia, trovi la rimedojn, lingvajn aŭ ne, kiuj permesos la komunikadon (tio estas intelekta laboro) sed trovi ankaŭ la volon persisti en tiu dialogo ĝis efika kompreno, kaj tio estas strebo pli morala ol intelekta. Kiam oni sumas tiujn malfacilaĵojn, oni komprenas kial tiel ofte la homoj nur ŝajne komunikas. Por ekstera observanto tia interŝanĝo kredigas la homojn surdaj.

Restas alia influo, ne neglektinda, kiu ankaŭ forlogas la homojn de komunikado, ĝi estas socia. Ne ĉiam sed ofte la homoj aliĝas al grupo kiu fariĝas kvazaŭ familio, frataro, kiu apartigas iujn homojn disde la aliaj. Sufiĉas pensi pri la naciaj lingvoj, kiuj diskriminacias la « fremdulojn », kun kiuj oni ne bezonas komuniki. Ke la fremdulo unue lernu « nian » lingvon, tiam ĝi estos « unu en nia grupo » kaj tiam ni komunikos. Kun la evoluo de la tekniko, kiu teorie permesas la komunikon kun ĉiuj, iuj povus pensi, ke la homoj deziros detrui tiujn lingvajn barojn (dissaltos la obstinaj baroj, per la sankta amo disbatitaj) kaj tiel kreiĝis la internacia lingvo de Dr Esperanto. Sed de 1887 oni konstatis, ke la propagandistoj de Esperanto ripetadis, ke tiu lingvo estas nur helpa, ke la esperantistoj nepre deziras konservi la naciajn lingvojn, kaj de kelkaj jardekoj homoj luktas, pace aŭ bombe, por la etnaj lingvoj. Kiam homo elektas lingvon, kiun la najbaroj ne komprenas, ĉu li deziras komuniki

aŭ sin esprimi, esprimi sian naciecon ? Tiu apartigo cetere ne estas nur nacia, homoj ankaŭ uzas slangon por eniri socian klason. Tio ne estas nova, kaj ĉirkaŭ la 1900-a jaro, la riĉaj burĝoj ludis imiti la lingvon de la krimuloj, sed la tiama ludo fariĝis pedagogia teorio. Ekzistas nun instruistoj, kiuj instruas dialekte, aliaj slange ; se necesas oni malfermas por tio specialajn lernejojn. Ne enirante en tiujn sociajn problemojn, mi nur konstatas, ke en diversaj medioj, oni pli kaj pli instruas al la homoj unue sin esprimi... kaj komuniki nur kun iuj « selektitaj » amikoj. Kaj tia tendenco esprimiĝas en la esperanto-movado. Antaŭ tridek jaroj, kiam urbo estis loko de internacia kongreso, ĝi ricevis esperantan nomon, kaj parolante, la kongresintoj povis interŝanĝi memoraĵojn pri « Parizo, Munkeno, Vieno, Varsovio... ». Nun, kiam vi serĉas la liston de tiuj urboj, vi baraktas por deĉifri la naciajn nomojn : « Paris, München, Wien, Warszawa... » ĉu estas pli facile interkompreniĝi kiam oni prononcas tute malsame tiujn fremdajn nomojn ? Per tiu sistemo la franco superos la aliajn en prononco de « Paris » kaj stumblos antaŭ München, Wien aŭ Warszawa, sed reciproke la germanlingvano ĝuos superecon pri München k.t.p. Oni malfacile komunikas, sed kiel belaj estas la naciaj esprimoj.

Ĉu la homo deziras komuniki ? Eble jes, eble ne. Kiam la homo ne deziras komuniki sed nur sin esprimi, tiam estas facile elekti iun rimedon kaj uzi ĝin. La demando : « ĉu la esprimaĵo estas bela », tio ne estas mia nuna problemo, kaj mi lasas la ricevanto taksi tiun valoron. Sed kiam la homo deziras komuniki, ĝi ekiras laŭ tre malfacila vojo. Ĝi devas atenti pri la ricevontaro, ĝenerale tre diversa, kaj se ĝi elektas tian parolon, iu komprenos la aliaj ne, sed se ĝi elektas alian esprimon, tiam la aliaj eble komprenos sed ne la unuaj. Eĉ kiam la ricevontaro estas escepte homogena, tiam la sendanto povas adapti sian mesaĝon al la ricevontoj, sed ĉu certas, ke la objektiva enhavo de la mesaĝo fidele resendas tion, kion li subjektive deziris esprimi ? Kaj kion pensi pri la alia transformiĝo inter la objektiva mesaĝo kaj la subjektiva interpretado de la ricevantaj individuoj, kiuj ĉiuj havas sian propran konceptaron ? Laste sed tamen grave estas bone projekti komunikadon, sed por komuniki oni devas esti almenaŭ du, same kiel por pace kontrakti. Se iu deziras komuniki kun alia, necesas ke tiu alia akceptu tiun proponon, kaj tiu akcepto estas malfacila kaj pro psikaj kaŭzoj (oni preferas konservi siajn kredojn, opiniojn, ol aŭskulti atente la kritikojn de alia) kaj pro la socia premo, kiu tendencas ligi la individuon al grupo el kiu estas maldece home interrilati. Temas tiam pri la kolektiva defendo de la komunaj valoroj, nur « perfidulo » akceptas aŭskulti parolanton de la alia batalkampo, kaj nur kuraĝuloj riskas tiun hontigan riproĉon.

Kiam oni sumas tiujn malfacilaĵojn, ĉe la elsendo por trafe trovi la esprimilojn, ĉe la ricevo por kuraĝi, spite al sia kaŝa deziro, kaj spite al la socia premo, tamen vere atente kompreneme aŭskulti, oni komprenas, ke statistike oni povas nee respondi al mia demando. Plej ofte, en la ĉiutaga vivo, la homo ne deziras komuniki. Tiu ordinara homo, en la kutimaj cirkonstancoj preferas konservi sian kredaron, kiu unue protektas ĝin kontraŭ la malagrabla dubo, kiu due ligas ĝin kun la homa grupo, kie ĝi kutimas vivi ; tia vivo estas pli komforta. Sed se la homoj ĝenerale ne komunikas, kial ili tiel ofte emfazas pri la komunikiloj, la kunvenoj, la kongresoj kaj aliaj kolokvoj ? Tute simple, ĉar la homoj, se ne komuniki, tre deziras sin esprimi. Tial ili sendas mesaĝojn al la amikoj, kiuj jam pensas same, estas kolektiva monologo, kolektiva plifortigo de la komunaj sentoj, socia rito, kies rolo estas plifirmigi la sociajn ligojn jam ekzistantajn. Kaj kiam, de tempo al tempo, renkontiĝas malsamaj opinioj, ĉiu tiam sin esprimas por kontraŭbatali la aliajn, ne por kompreni ilin, sed por efike influi al la homoj, kiuj hezitas inter du kredoj. Ne temas pri komuniko, sed pri konkurenco antaŭ la publiko. Kiam du biciklistoj konkuras, ne temas pri komuniko, sed pri spektaklo por la aliaj, tiel same la politikistoj sin esprimas ĉe televido, ne por komuniki kun la alia, kiu sidas fronte de ĝi, sed por laŭte esprimi sian kredon, kun la espero esti pli elokventa ol la konkuranto. Tia spektaklo estas instigilo al imitado de tiaj falsaj dialogoj, kaj tial la plenkreskuloj, same kiel la junaj infanoj sin esprimas, sed ne komunikas.

Jen ekzistas lingvaj baroj inter la homoj dividitaj, kaj nun oni pli kaj pli multigas tiujn barojn je la nomo de la aparteco de la grupoj. La unuaj esperantistoj kredis, ke unu komunikilo : la internacia lingvo dissaltigos tiujn barojn... sed mankas la sankta amo por disbati ilin. En la nuna mondo, la komunikado estas tiel malfacila, ke krom kelkaj herooj, la homoj preferas la facilan vojon de la memesprimo, kaj plej ofte ne deziras komuniki.

El prelego prezentita en 1983
de F. BOYER.

POR VIA DISTRO KAJ PERFEKTIĜO

BALDAU KOMENCIĜOS LA LONGAJ VINTRAJ VESPEROJ. KIAL NE UZI TIUN TEMPON POR PERFEKTIĜI EN ESPERANTO AMUZIĜANTE ?

JEN LA TAŬGA LIBRO « INSTRUAMUZO » DE MARĈEK-MARKOVIĆ, KUN KRUCVORTENIGMOJ KAJ HUMURAĴOJ.

PREZO : 15 F + SENDOKOSTOJ. HAVEBLA ĈE NIA LIBROSERVO.

LA MASTRO DE KERBOJA, (fino)

AMROMANO EN KAMPARSOCIA STRUKTURO

12 — « Al Jüri ne plaĉis, ke Villu kun sia KIVIME volis superi lin kaj lian Katku, kiun li estas gardinta, kiel la pupilon de sia okulo, ke Villu ankaŭ la festantojn kondukis preter Katku ».

Villu eldiras siajn planojn rilate al Katku, kiuj postulos « la tutan vivon ». Por li gravas nur fari « tian aĵon, kiu glate funkcias en ies ajn manojn ». Dume li manipulas ĉe la ŝtonoj sed pro duon-ebria stato li bezonas pli da tempo ol kutime kaj la eksplodego okazas antaŭ ol li kaj Mikk (la ĉeflaboristo) estas for. Ambaŭ estas vunditaj. Nur Anna ne perdas la kapon. « Hodiaŭ ŝi ne timas sangon, ĉar hodiaŭ flugas la sango de Villu de Katku, fluas kaj kovras la maldekstran okulon kaj la dekstra mano estas nura sangobulo ». Ŝi disŝiras delikatan subveston kaj bandaĝas la kapon kaj manon de Villu. Atendante, ke oni jungu la ĉevalon li sakradas pro suferego. Anna petas brandon de Jüri, kiu rifuzas : « Sufiĉas jam tio, kial malŝpari ankoraŭ brandon ? Ĝi estas mia mono. Kêrboja aĉetu por li brandon ! Lasu lin suferi kun klara kapo, eble li tiam fariĝos prudenta, ne iros plu en ebria stato dispecigi ŝtonojn ».

Ĉeestanto alŝovas botelon. « Trinku tiom, kiom vi povas, eltrinku ĉion », insistas la mastrino.

Oni alveturigas la vunditojn al la urba hospitalo. « Villu sidas, kaj la mastrino de Kêrboja staras apud li, kvazaŭ ili estus fianĉo kaj fianĉino ».

13 — Anna agadas kvazaŭ ŝi ne estus mastrino. Ŝajne ŝi ion atendas. Ŝi ofte veturis al la urbo. Al la rehejmiĝinta Mikk ŝi direktis kiel unuan demandon la jenan frazon : « Kiel estas la okulo de Villu ? Ĉu li estos blinda ? ». Eksciinte de la kuracisto, ke tute blinda li ne fariĝos, ŝi ekakiras novan interesiĝon al Kêrboja. Ŝi eksperimentas novan nutromanieron por la somerlaboristoj. Ĉiuj ekĝojas pro la plibonigo de la ĉiutaga manĝaĵo krom unu ribelemulo : « Per haringaĉoj mi ne lasos min subaĉeti, por butero mi ne vendos mian animon, tion sciu la mastrino ».

La foinorikolto finiĝas pli frue ol kutime. En la profundo de sia koro Rein esperas plenan blindiĝon de Villu por ke li ne plu povu fariĝi mastro ie ajn. Tamen la ĝojo transiras al la koro de la filino. « En Kêrboja ekzistis nun nur unu ĝojo kaj ĝin oni ne povis dispecigi kaj dividi inter pluraj, eĉ ne inter filino kaj patro ». Finfine li pridemandas la filinon, kiu respondas : « Kiom ajn absurda tio eble ŝajnas al vi, sed tiel povos efektive okazi. Tiom li vidas, kiom mastro bezonas. Sed Villu tamen eble eĉ kiel blindulo esti mastro de Kêrboja pli bone ol iu alia ». Kaj plua interparolado renversas la situacion : « Ne diru, ke la sola filo kaj heredanto de Katku fariĝos mastro de Kêrboja kaj translo-ĝiĝos ĉi tien, li ja ne reiros al Katku kiam li heredos la patran bienon, sed restos ĉi tie ankaŭ post tio kaj kunigos « Katku » kun Kêrboja, ne « Kêrboja » kun Katku. — Mi ne volus, ke Villu fariĝu mia bofilo. — Bone, patro, sed en tiu okazo mi foriros el Kêrboja. — Ne, ne ! Se la afero estas tia, tiam agu kiel vi volas, mi min en viajn aferojn ne miksas ».

La patro timas, ke en okazo de kontraŭstaro ŝi iru al Katku : ĉi tion li ne povus elporti.

14 — Reveno de Villu. « Vi venas sola, demandis la patrino. — Kun kiu mi venu, demandis Villu siavice ? — Sekve vi tamen vidas ! ekkriis la patrino kun tia ĝojo, ke tio tuŝis eĉ la koron de Villu mem. Neniam antaŭe Villu rimarkis, ke la ĝojo de la patrino povas infekti lin. — Vi estas ja kriplulo ! ekkriis la patrino vidante la dekstran manon de la filo. Apenaŭ vi povas akcepti per ĝi panpecon. — Bonŝanco, ke almenaŭ la polekso kaj tiuj du stumpoj restis. Kiam mi iom alkutimiĝos al ili, mi faros fine ĉiujn laborojn, tiom, kiom la okulo vidas. — Via vivo estas kiel apogpaliso de barilo : ĉiuj aksingoj kaj radioj alkroĉiĝas al ĝi ».

La patro rigardas la manon de la filo. « Antaŭe vi kuris, kiel knabaĉo, nun vi vivas kiel kriplulo, viro vi neniam fariĝos. Nur por unu afero vi taŭgus ankoraŭ. — Por kio ? — Fariĝi mastro de Kerboja. — Patro, tiel vi ne devus paroli. — Ne mi parolas, ĉiuj parolas kvazaŭ el unu buŝo, ke vi fariĝos mastro de Kêrboja ».

Tamen la patro mildiĝas (laŭ sia kapablo...) vidante, ke la filo laboras superforte. Dum pulsas akra doloro Villu klarigas al li, ke pli volonte li reirus en malliberejon, ol en hospitalon, ĉar sur la unua loko oni ja povas labori.

Li provas ekscii de la patrino pri la disportantoj de klaĉaĵoj : « Unu aferon mi diras al vi, patrino : kiel kriplulo oni ne fariĝas mastro de Kêrboja ; almenaŭ mi ne fariĝos ; ĉion alian, sed ne tion, parolu la homoj kion ili volas, aŭ okazu kiel okazos. Kio enkapiĝis al Anna, tion mi ne scias, pri tio eĉ unu vorton ne parolis kun ŝi ; sed kio estas en mia kapo, tion mi scias ». Restas por li ununura ebleco : fariĝi mastro en Katku kaj edziĝi ie Evi, se ŝi akceptos blindulon kaj kriplulon. Pri tio li certiĝos post vizito al la kabano.

15 — « Nun la mano de Evi serĉis la manon de Villu, ŝi trovis ĝin. La junulino preskaŭ ekkrietis, kiam ŝi anstataŭ mano sentis en sia polmo ian tuberhavan klabon. — Kompatema Dio ! Ŝi vokis preskaŭ plorante kaj prenis nun la dekstran manon de la viro inter siaj du sanaj manoj kaj rigardis ĝin en la mallumo tenere kaj delikate, kvazaŭ timante ke ĝi rompiĝos. Villu sentis, ke tiom tenere kaj delikate ankoraŭ neniu observis lian malsanan manon, kiel faris tion Evi, verŝajne eĉ la patrino. ... Evi

denove prenis la dekstran manon de Villu, ŝi prenis tiun kriplan manon tiamaniere, ke Villu havis agrablan senton kaj volonte iris post Evi al la proksima piceo kaj sidiĝis sub ĝi ».

« Montru, diris la junulino, kaj prenis la kapon de la viro por rigardi ankaŭ la okulon kaj per la polekso de la maldekstra mano malrapide movi laŭ la vundocikatroj ».

Villu proponas al ŝi geedziĝon kaj kunvivadon. Ŝi fariĝu mastrino en Katku. « Evi nenion diris je tio, ŝoviĝis nur pli proksimen al la viro kaj karesis lian kriplan manon, kvazaŭ ŝi ŝuldus al ĝi dankon pro la vortoj de la viro, mankaresis kaj kliniĝis super ĝi kvazaŭ ŝi intencus kisi ĝin, sed ne, nur larmoj falis sur la manon ».

Ili parolas pri la infaneto, la mortonta patrino, la nedubebla elkabanigo fare de malmolkora posedanto. « Ho Villu ! Kiom da malbono mi aŭdas pro vi ! ... Ĉiu bojas, ĉiu mokas, eĉ muknaza bubo jam trouzas sian langon. Tia estas mia vivo. Krome la mastrino de Kêrboja, per ŝi oni incitas min la tutan tempon, kiel bovon per ruĝa tuko ».

16 — Villu tamen prokrastas la necesan interparoladon kun la patro pri geedziĝo. Ĉe la lago li kontroladas sian vidkapablon kaj ties malakrecon kaj meditadas pri la problemo de la mastro de Kêrboja, ne kiel partoprenonto sed kiel observanto. Iun belan dimanĉon Anna venas al la lago kaj ili elvokas la pasintecon. Pro ŝi li elpikis sian dekstan okulon kaj forperdis la maldekstran...

17 — Nun li bedaŭras, ke li parolis kun la mastrino pri sia dekstra okulo sed kun li ĉiam same okazas : en ĉeesto de la mastrino li ne kapablas bridi sian langon.

Li interkonsentas kun la patro pri la geedziĝo tial, ke restas nenia ajn ebleco, sed pri nupta festo la patro ne konsentas, ĉar Evi estas eksservistino en Kêrboja. Li riproĉas la filon, ke li entreprenis frenezaĵojn sur la bieno. Villu rebatas, ke same kiel la patro kiam li estis juna, li deziris fari ion grandskalan kaj valoran sur la bieno, alporti sian kontribuon. Li prilaŭdas la laboremon kaj viglecon de Evi, ŝian deziron eduki infanojn kaj vivi kiel plenrespondeca virino, same kiel kondutis la patrino de Villu. La patro kun kaŝita ĝojo konscias, ke la filo prudentiĝas, sed pro tio, ke neniam en sia vivo li nuligis siajn vortojn, li ne cedas pri la nuptofesto. Sekve Villu ne rakontos al Evi tiun diskuton kaj ĝisatendos, sed kion ? Li eĉ ne scias precize.

Evi pluvivas sian senesperan vivsorton kaj la patrino admonas ŝin pri la vira ŝanĝiĝemo kaj la neebleco fariĝi laŭleĝa edzino, kiam oni tro frue plenumadis viran deziron.

18 — Preteratentante la patrinan saĝon Evi decidas iri mem al Kêrboja kun la fileto surbrake por peti de Anna, ke ŝi lasu Villu al ŝi. Sur la korto ŝi estas akceptata de Rein kaj de la kadukiĝinta hundego, kiu flaras ŝin rekone, ĉar dum sia mielmonato kun Villu ŝi dorlotis ĝin per bongusta nutraĵo el la propra porcio, por ke ĝi ne boju averte. Ŝi petas interparolon kun Anna, kiu afable ŝin enlasas kaj tuj interesiĝas pri la infaneto.

« Ĉu li venos sur la sinon de onklino ? ». Ambaŭ virinoj interbabilas kvazaŭ nenio alia gravus. Kaj la afero restas neparolata. Post demando de la mastrino, pri kio temas, Evi nur ploras kaj prialudas la sanstaton de la patrino. Anna promesas viziti ŝin, eĉ venigi kuraciston. Demandite de la patrino pri tiom longa malĉeesto kun la infano, Evi respondas, ke ŝi nur vagadis tie kaj ĉi tie kaj neniom parolas pri sia vizito.

19 — Estas la avelfesta tago. Neparoleme sidadas Villu (al la patrino li jam rebatis : « miaj paroloj estas jam parolitaj, miaj iradoj estas iritaj, miaj kuradoj kuritaj »). Tiuj, kiuj havas kontojn por reguligi kun li instigas lin, ĉu foriri, ĉu drinki. Kaj li drinkas kaj dancas kun junuloj. Lia sinteno ŝanĝiĝis depost kiam Anna demandis, ĉu li « vidas ankoraŭ la tremolon, en kies « foliaro troviĝas jam ruĝo ».

Kiam li invitas ŝin, ŝi riproĉas, ke li drinkis. Sed post insistemaj petovortoj ŝi tamen konsentas. Villu falas kaj faligas sian kundancantinon, ŝiaj vestoj estas malpurigataj sed neniu aŭdacas ekridi pro la mastrino, kies servistinoj hontas. Villu povus mortbati ekridanton, sed nenion li faras : « la grandaj tagoj de Villu pasis, la kanto de Villu estas kantita ». Li staras apud la mastrino kun mallevita kapo. Ŝi rilatas al li kvazaŭ konsole : « Mi jam diris al vi, nun vi vidas ! Kaj ridetante : Ni provu denove ». Finfine restas nur ili sur la dancejo kaj Anna eldiras sufiĉe laŭte, por ke la aliaj povu aŭdi : « Vi ja ne falas, kiam la aliaj kun siaj piedoj ne malhelpas ». La plej ŝercema vilaĝano senmalice komentas : « Kêrboja iras kun siaj du « Mousi ». (Mousi estas la nomo de la hundego).

20 — « Komprenu do finfine : mi invitas vin al Kêrboja kiel mastro ». Kaj ŝi ploras.

« Tio devus okazi pli frue, diras Villu, eble tiam, kiam mi ankoraŭ havis la alian okulon kaj miaj ambaŭ manoj estis sendifektaj. Sed nun por kio mi tiel taŭgas ? — Kompreneble tio devus okazi jam tiam, kiam mi elbatis vian okulon se mi jam estus mastrino de Kêrboja. Sed mi estis tiam nenio, kiam mi kun vi tiel ludis kaj fine pro kolero elbatis vian okulon ».

Ŝi klarigas, ke ŝi ŝajnigis timi morton post serpentomordo por submeti lin al provoj. Nur dorno pikvundis ŝin. Ili interbatalis per ruĝaj beroj. Pro venĝodeziro ŝi elsuĉigis al li sian piedon, eltenis la doloron kaj kuris en la lagon.

Villu klarigas, ke kun li ĉiam okazas malĝuste, ĉion ajn li egas. « Vi parolas pri via malfeliĉo kiel pri ia fatalo, kiun oni ne povas eviti », konstatas Anna.

« Por edzo miaspeca kriplulo ne taŭga. — Sed la mastrino kaj fraŭlino de Kêrboja tiun kriplulon volas. — Tiam la kriplulo ne volas ».

Ŝi ploras. « Mi ja volas, sed mi ne povas, ekkrias Villu. Tion mi povus fari nur en ebria stato. Mia tempo pasis. Se vi volas, mi venos kiel servisto, edziĝos kun mia Evi, faros tie ĉion kion mi povu... — Venu kiel mastro ». Ŝi eĉ proponas

venigi « Evin » kaj eduki la infanon, kiel mastron. Sed Evi ne povos konsenti.

« Mi diris al la patro, ke mi restos tie nur en tiu okazo, se vi fariĝos mastro. — Sed en mala okazo ? — Ni vendos « Kêrbajan » aŭ farmigos ĝin. ... Tie vi estas necesa, tie vi estas atendata. Venu tuj, venu en la dimanĉa vesto. — Ne, mi ne povas. En Kêrboja mi fariĝos por vi ŝarĝo kaj por mi mem turmento ».

Ŝi mankaresas lian stumpon kaj ĝin alparolas kvazaŭ vivantan estaĵon. Ili estas tute proksimaj, tiel ke li ĉirkaŭprenas ŝin. Li estas truddevigata doni definitivan respondon post kelkaj tagoj. Li revenas al Katku « en pli granda malespero, ol iam antaŭe ».

21 — Mortis la hundego. Oni ĝin enterigas sub la benko apud la sorpoarbo en la fino de la ĝardeno. Sammomente aŭdiĝas el la direkto de Katku kvazaŭa hurlado de freneziĝinta hundo. Anna aŭskultadas en maltrankvilo ĝis ŝi ekscias, ke Villu dumnokte mortpafis sin « per ŝargaĵo de kugletaĵoj ». Nun regas paco en la koro de Anna. Ŝi ŝlosfermiĝas en sia dormoĉambro kaj sin vestas per veturvestaĵoj. Al la eliranta filino la patro demandas, kien ŝi estas ironta. « Mi ne scias », ŝi simple respondas kaj survojiĝas. Ŝi direktas sian paŝadon al Katku.

« Iam Rein sekrete ĝojis, kiam Villu de Katku kripligis sian dekstran manon kaj difektis sian sanan okulon, sed pro lia morto troviĝas en la koro de la maljunulo neniom da ĝojo, kiam li ŝteliras malantaŭ sia filino ».

22 — Kiam la Katku-mastrino aŭdis dumnokte la hundan tirbojadon ŝi ektimis, rememorante ke la antaŭan vesperon Villu estis kunpreninta la pafilon kaj ĝin kunportinta en la tenejon, kie li dormis. Ĉe la tagiĝo ŝi ellitiĝas kaj rigardas trans la fenestro. « La hundo sidis antaŭ la pordego de la intertenejo, levis « la muzelon al la ĉielo kaj hurlis ». Sur la sama loko gardosidis la hundo en la mateno, kiam Villu estis redomiĝinta post sia puntempo.

Panikego ekkaptas la maljunulinon. Ŝi vekas « Jürin » kaj klarigas sian timosenton. « Kio al li povas ankoraŭ okazi ? ». Li ŝajnigas trankvilon sed postrigardas la edzinon. Ĉi tiu malfermas la pordon, preskaŭ falas sur la hundon, ŝanceliĝas kaj heimenkuras. Ŝi ne kapablas respondi al la edzo, kiu venas mem por vidi. Surplanke kuŝas la senviva filo, kun la pafilo apude. La plankon li antaŭe purigis por ne okazigi incendion.

« La unuan fojon en sia vivo li kondutis kiel viro », rimarkas la patro. ... — Kiun doloron li certe havis ! ĝemis la patrino. — Ho ne, patrino, respondis la patro konsolante. Nia Villu ne scipovis vivi, sed li mortis, kiel vera viro ».

Dum Jüri iras al la urbo por akiri ĉerkon Anna vizitas « Katkun ». Riproĉas la patrino : « Kion vi hieraŭ faris al li, ke li tiel... — Mi invitis lin al Kêrboja kiel mastron. — Vi ne donis trankvilon al vi ĝis vi atingis kion vi volis. — Patrino, tion mi ja ne volis ». Kaj ili ploras ambaŭ kune, kvazaŭ patrino kaj filino.

Anna decidas tujan forveturon kaj komisias la maljunulinon averti ŝian patron post la ekiro de la trajno. Ĉi lasta rakontas al la envenanta edzo : « Oni invitis lin al Kêrboja kiel mastron kaj li pro tio mortpafis sin ». Sed nenion komprenas la patro.

23 — Elirinte el la korto de Katku per paŝo de maljunulino Anna estas deflankiĝonta al alia direkto, ol tiu de la fervojo sed antaŭ ol ŝi sukcesas tion fari ŝi ekvidas « iun sidantan sur pinradiko sur mola musko inter ruĝe ardantaj vakcinioj ». Tiu sidanta homo tenas infanon sur la sino, ploras, « sed la infano inter la ruĝaj beroj sur ŝia sino trankvile dormas, dormas kaj suĉas siajn fingrojn ».

Evi salutas ; Anna ŝin rekonas. Post ĵusa forpaso de la patrino ŝi intencis iri al Katku por peti helpon de Villu ; sed survoje ŝi eksciis. Ŝi plendas, ke post nelonge la kabanposedanto ilin forpelos.

« Venu al Kêrboja, venu kun la knabo al Kêrboja ».

« Por la mastrino restis nenio alia, ol surgenuiĝi apud Evi sur la mola musko, inter la ruĝaj beroj, eĉ sur beroj ĉar ili estis nekalkuleble multaj ĉi tie sub la arbo ».

Ŝi invitas. Al ili la plej belan ĉambron ŝi donos. Rein kaj la onklino Madli transloĝiĝos al la bienlima kabano laŭ sia jam esprimita deziro.

« Kaj la mastrino prenis la filon el la sino de Evi, prenis lin sur siajn brakojn. — Venu, pli bone por vi estos, ol nenie. Lasu. mi portos la knabon, vi portis lin jam sufiĉe ». Evi obeas.

« Ŝi portis sur la brakoj la filon de Villu de Katku, kiun ŝi trovis inter ruĝaj beroj sur la sino de la ploranta patrino ».

Sin direktante al la patro : « Mi alportis al Kêrboja mastron ».

« Li eksentis grandan ĝojon pro sia filino, sentis grandan ĝojon ankaŭ pro la infaneto, kiun la filino tenis sur la brakoj ».

Evi ploras. Ŝin rigardas la infano.

« Mi kunhelpos kiom mi povos kaj mi kapablos », promesas Rein.


En la ĉambro de Anna dormas la filo de Evi. Tion scias la patrino de Villu, kiam ŝi alvenas plenumonte sian mision. « Ŝia koro estis tute malpeza, pli malpeza, ol kiam ŝi venis al Kêrboja ».

« Nun komenciĝos en Kêrboja oraj tagoj. Sonoras Kêrboja mem, sonoras ĝia erikejo kiel pina trumpeto dum printempa vespero, kaj ŝajnas kvazaŭ ĉio resonus de la lago, tiel ke nur iru kaj rigardu, rigardu kaj aŭskultu, kiel ĉio moviĝas kaj sonoras. ... Sed festojn ĉe la lagobordo ŝi ne plu partoprenis, neniam plu ĉar Kêrboja havis nun mastron ».

S. BONIOL.

POR VIA DISTRO

Solvo de la antaŭa problemo



	1	2	3	4	5	6	7	8	9
1	E	S	P	E	R	A	N	T	O
2	S	E	S		U	R	E	O	N
3	P	S	I	K	I	A	T	R	O
4	R	A	K	O	N		R	E	B
5	I		O	S		L	U	A	R
6	M	U	L	T	A	G	A	D	I
7	A	T	O		M			O	K
8	D	I	G	R	A	M		R	O
9	O	L	E	A	S	T	R	O	J

La stoko de ludoj estas elĉerpita !

Ni bezonas **facilajn** krucvortojn aŭ problemojn por plenigi tiun paĝon, kaj ni dankeme atendas viajn proponojn.

HUMORAĴO

Fulm-aviadilo

Telefonparolado. La klientino :

— Ha-lo ! Orly... Kiom da tempo daŭras la aervojaĝo Parizo - Romo, aviadile ?

La okupita oficisto :

— Unu minuton, sinjorino...

La klientino :

— Dankon.

Ŝi remetas la aŭdilon sen montri la plej malgrandan surprizon.

La kvina infano

Juna edzino parolas pri sia lastfoje naskita infano. Sinjoro ĝentile interesiĝas :

— Kaj kiom da infanoj vi havas ?

— Mi havas nur kvar — ŝi diras kaj aldonas — feliĉe !

— Kial feliĉe, sinjorino ?

— Ĉar mi legis artikolon, ke inter kvin infanoj kiuj naskiĝas en la mondo, troviĝas ĉiam unu ĉino ! Imagu min kun ĉina infano surbrake !

Rozo

Marius renkontiĝas kun Olive surstrate kaj vidas belegan floron en la butontruo de sia malnova amiko kaj ekkrias :

— Ho, la bela rozo !

— Sed ĝi ne estas rozo — protestas Olive — « c'est un chrysanthème » (ĝi esta krizantemo).

— Kio ?

— Un chrysanthème.

— Un chrysanthème, kiel vi skribas ĝin ?

Olive iome pensadas kaj respondas :

— Vi pravas, ĝi estas rozo !

Leon-ĉasado

Marius rakontas al Olive sian lastan ekspedicion.

— Subite en la nokto mi vidas du fosforeskantajn okulojn. Mi pafas mezen, ili estingiĝas. Ili ekflamas, mi pafas ili estingiĝas kaj tio okazas dekokfoje. Sekvan matenon mi iras tien. Mi mortigis dekok leonojn.

Unu semajnon poste Olive rakontas al Marius :

— Mi estis sur la sama loko. Mi vidas la fosforeskantajn okulojn, mi pafas mezen ; ili ne estingiĝas kaj jene okazas la tutan nokton.

— Bua Diu (Bona Dio) ! Kion signifas tio ? — ekkrias Marius.

— Estis leonoj, kiuj ellernis, kion fari. Ili iradis duope unu tuj apud la alia kaj unu el ili fermis la okulon dekstran kaj la alia la okulon maldekstran.

El la franca tradukis : Istvan Nagy.

GRAMATIKO PER BONHUMORO

LA ADJEKTIVA PREDIKATIVO

RIMARKO : la adjektivo montras **Veran** kvaliton de la substantivo — mi admiras la altan monton.

LA PREDIKATIVO esprimas nian propran juĝon (sen akuzativo) helpe de kelkaj verboj tiucele uzataj (juĝi kredi, opinii, nomi...) — vi juĝas tiun filmon bona, sed mi trovas ĝin malbona).

RIM : la predikativo neniam rekte antaŭas la substantivon :

— mi vidas la ludantajn knabojn (epiteto)


— mi kredas la knabojn ludantaj (predikativo).

JEN = ESTAS

— jen la projektoj pri kiuj ni parolis

— jen tio, kion mi skribis

Kiu ĝenas kiun ?



Estas laciga ! mi ne povas endormiĝi ! tiu maniero voki min ĉiun kvinan minuton por scii ĉu mi dormas, mi trovas tute nebonan !

Opinioj diversaj



Ĉu vi kredas bonan okupadon tiu trikado por la vintro ? mi trovas pli admirinda la ĉi-tiea pejzaĝo ; faru kiel mi : rigardu la bluan maron, la velŝipon, la belan monton sur la horizonto.

Miskompreno



Oni faras ĉion, kion oni povas por kreskigi la ekonomia revigliĝon de nia lando, kaj jen la dankon !

CERBUMU !

Ĉiu teksto, sub la bildoj, entenas **tri erarojn.** Trovu ilin, kaj **nur poste** legu la solvojn ĉi-sube :

— lacig**e,** tiu**n** manier**on,** nebona

— bona okupado, tiu**n** trikad**on,** ĉi-tiea**n** pejzaĝ**on**

— kresk**i**gi, ekonomia**n,** danko.

La korektotaj eraroj en la antaŭa numero (« Objekta komplemento ») estas la jenaj :

— longaj**n,** floroj, **cia**

— demandoj, nenio**n,** sciojn

— ĝardeno, gazontondilo**n,** li.

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (200 aŭstr. ŝil.).

Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 12, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (400 fr.).

Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter,** EX 4 6 JT (5,00 pundoj).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (75 kr.).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (50 mk).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (25 mk.).

Hispanujo : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10e - D ALICANTE - (975 pes.).

Israelo : Adrian Boldan, Merkaz Klitah, ATLIT (12 us. dol.).

Italio : S-ro Gaudenzio Pisoni, via Gorizia 17, 28100 NOVARA — p.k. 14321285 (12240 liroj).

Japanujo : S-ro Tara Niŝiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaŝi-Nakano, Hatiôzi-ŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2500 jenoj).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (12 U.S. dol.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL, ZH pĉk 209721 (24 guld.).

Norvegujo : S-ino Louise Bœ Marmarvn 2A Oslo 11 (55 kr.).

Pollando : Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO (12 us. dol.).

Svedujo : Eldona Societo Esperanto, poŝtkonto 596768-2 216.11 Malmö (55 kr.).

Svislando : Kultura Centro Esperantista poŝtfako 771. LA CHAUX-DE-FONDS - p.k. : 23-2921 La Chaux-de-Fonds (22 frs).

Usono : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (12 us. dol.).

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 12 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al : ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo.

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier. — N° C.C.P.P. 36.258 Le Gérant : P. BABIN

Supplément au n° 5 de 1983, de « KULTURAJ KAJEROJ »

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

Dans quelques jours, les derniers participants de la rencontre « Non voyants - Voyants » vont partir. Le parc ne va garder que ses fleurs encore épanouies. Ce dernier stage, cette rencontre de non-voyants et de voyants, première expérience de ce genre pour quelques-uns de ces derniers, a été appréciée de tous, tant par la qualité des activités, souvent de haut niveau, que par l'ambiance, renforcée par la présence inattendue de quelques espérantistes venus d'autres pays. Expérience qui mérite d'être renouvelée.

Les autres stages ont connu des fortunes diverses quant à la fréquentation. Les deux premières périodes ont vu une affluence qui nous a obligé deux ou trois fois à dresser une table à l'extérieur pour des espérantistes de passage. Bien que chacun ait dû parfois accepter une petite gêne dans les salles à manger, dont la surface n'est pas extensible, tout s'est passé dans la bonne humeur. On nous a dit que la qualité de la cuisine faisait passer la gêne occasionnelle d'être neuf à une table de huit. Les conférences, les cours, les autres activités (la reliure a revécu pendant le premier stage grâce au concours inattendu de M. Moirand) ont constamment rassemblé la presque totalité des présents. Tous les stagiaires ont semblé satisfaits, non seulement du séjour, mais aussi du travail fait et des résultats obtenus sur le plan de la pratique de la langue. Il est vrai que les conférenciers, les responsables de cours et les divers autres animateurs n'ont pas ménagé leur peine.

La troisième période, si elle n'a pas répondu aux espoirs en ce qui concerne le nombre des participants, semble cependant avoir confirmé sa place dans le programme. Les activités proposées : céramique, patchwork, cartonnage, ont attiré la très grande majorité des présents grâce aux animateurs professionnels. La qualité des réalisations atteste le sérieux et l'intérêt du travail fait. Une ambiguïté demeure en ce qui concerne les cours, en particulier celui des débutants. Une nouvelle formule sera mise au point qui pourrait apporter satisfaction plus complète.

Les résultats financiers provisoires seront connus le 23 octobre, à la réunion du Conseil d'administration. Celui-ci sera important à plusieurs titres. Plein pendant les deux premiers stages, le château ne l'était qu'à moitié et même parfois moins pendant les deux autres. Il est probable que les recettes seront honnêtes. Quant aux dépenses, nous n'en pourront connaître l'ampleur que lorsque nous aurons reçu toutes les factures. Quelles seront nos possibilités d'investissements ? Nous devons d'abord rembourser, comme promis, un tiers de la somme mise à notre disposition par ceux qui ont permis le financement de l'installation du service d'eau. Ensuite ? Les travaux souhaitables ne manquent pas : aménagement des chambres extérieures, w.-c. et douches des campeurs, électricité du rez-de-chaussée... Les dons spéciaux vont permettre l'achat d'un photocopieur. Le choix est difficile. La « Fonduso arboj » a repris vigueur et quelques dons nous ont été faits sur ce chapitre. Les intérêts du capital de la « Fonduso Belbona Espero », dont nous avons accepté la gestion, ont permis à deux jeunes espérantistes de séjourner à Grésillon. La quatrième édition de « Por la Praktikantoj » est sortie en juillet, juste à temps pour faire face aux commandes.

Que dire d'autre de cette saison 1983 ? A part les quelques incidents habituels... ou non, matériels, techniques, humains, l'été a surtout été marqué par les orages comme ailleurs, avec leurs conséquences : chemins ravinés, cave inondée, courant électrique coupé, mais aussi un temps magnifique... entre les perturbations.

En octobre se décidera le programme de l'an prochain. Nous avons déjà plusieurs inscriptions fermes. Certains d'entre vous n'ont pas pu venir cette année faute de place libre. Alors ne tardez pas. Vous pouvez déjà vous inscrire pour 1984.

P. BABIN.

INTER NI

Post kelkaj tagoj la lastaj ĉeestintoj de la renkonto « Ne vidantoj - Vidantoj » foriros. Tiu renkonto, unua sperto por kelkaj, estis tre ŝatata de ĉiuj pro la altkvalitaj aktivaĵoj, kaj pro la bona etoso. Vizitis ĝin pluraj eksterlandanoj. Tiaj renkontoj certe denove okazos.

La aliaj periodoj ne ricevis saman nombron da ĉeestantoj. Dum la unuaj du estis du-aŭ trifoje necese meti manĝotablon ekstere por la vizitantoj. Spite al la ĝeno kaŭzita de la fakto, ke okazis iom da premado en la manĝoĉambroj, ĉiuj estis tre kontentaj dirante, ke la kvalito de la manĝaĵoj forgesigis la malgrandan ĝenon. La diversaj aktivaĵoj, prelegoj, kursoj k.a. kunvenigis preskaŭ ĉiujn ĉeestantojn. La progresoj koncerne la praktikado de la lingvo estis rimarkindaj.

La tria periodo, kvankam ĝi ne trovis kontentigan sukceson koncerne la nombron da partoprenantoj, tamen konfirmis sian lokon en la programo. La intereso de la ĉeestantoj aperas en la nombro kaj kvalito de la faritaĵoj. Ne tre klara estas la rolo de la kursoj en tiu periodo sed nova formo estos donita, kiu espereble kontentigos ĉiujn.

La provizoraj financaj rezultoj estos donitaj okaze de la kunveno de la Konsilantaro la 23-an de oktobro. La kastelo estis plenplena dum du periodoj sed nur duone plena dum la aliaj du. La enspezoj estos probable sufiĉe bonaj. Kiaj estos la elspezoj ? respondon ni povos doni nur kiam estos ricevitaj ĉiuj fakturoj. Kiom da mono estos disponebla por nova investado ? Unue ni devas repagi la trionon de la sumoj pruntitaj por la instalado de la kuranta akvo. Poste la farendaj laboroj ne mankas : renovigo de la ĉambroj en la eksteraj konstruaĵoj, duŝoj por la tendumantoj, renovigo de la elektra instalaĵo sur la teretaĝo... Specialaj donacoj nun permesas la aĉeton de fotokopiilo. La Fonduso « arboj » revigliĝis, ĉar ni ricevis monon. La Fonduso Belbona Espero permesis al du junaj eksterlandanoj viziti la Kulturdomon senpage. La kvara eldono de « Por la Praktikantoj » aperis komence de julio, ĝustatempe por plenumi la mendojn.

Kion pli diri pri tiu somera sezono ? La kutimaj (aŭ ankoraŭ ne spertitaj) incidentoj, materiaj, teknikaj aŭ homaj, kaj ankaŭ kiel en aliaj lokoj, fulmotondroj, kun ravinigitaj aleoj, inundita kelo, ktp... sed ankaŭ mirinde agrabla vetero... inter la perturboj. En oktobro estos starigita la venontjara programo. Kelkaj el vi ne povis veni ĉijare pro manko de libera ĉambro. Do, ne prokrastu vian aliĝon. Vi jam povas informpeti.

1983 - GRÉSILLON

EKZAMENOJ DE FRANCA ESPERANTO - INSTITUTO

Atesto pri Elementa Lernado

Alexandre Serge, Chrétien Patrick, Dujardin Raymond, Hastir Claude, Larminieer Luc, Montulet Daniel Pairoux Nikolina, Passelègue Christiane, Passelègue Olivier, Pravisano-Montulet Marie-Claude, Wallez Nicole, Wigger Hans-Ruedi.

Atesto pri Praktika Lernado

Brient Jacqueline, Canavaggio Blanche, Sabatier Thérèse, Zakowsky Michel.

Atesto pri Kapableco

Cavalié Calixte, Le Puil Armelle, Sire Serge.

—

INTERNACIAJ EKZAMENOJ

Internacia Atesto pri Elementa Lingvoscio

Chrétien Patrick (Fr.), Dujardin Raymond (Belg.), Durham Una (G.-B.), Garcia-Pripoll Marti (Katal.). Hastir Claude (Belg.), Larminier Luc (Belg.), Loose Gisela (R.F.A.), Martinez Isabela (Fr.), Montulet Daniel (Belg.), Pairoux Nikolina (Belg.), Pravisano Marie - Claude (Belg.), Shoeibi Fatemeh (Iran), Wallez Nicole (Côte d'Ivoire), Wallez Corinne (Côte d'Ivoire), Wigger Hans-Ruedi (Suisse).

Internacia Atesto pri Praktika Lingvoscio

Curtis David (G.-B.), Kasselmann Hans (R.F.A.), Martinez Isabela (Fr.), Mintert Werner (R.F.A.), Sabatier Thérèse (Fr.), Shoeibi Fatemeh (Iran). Nos félicitations à tous.

NOS PEINES

Le 6 septembre, M. Cheverry, malade depuis plusieurs mois, est décédé. Tous les amis — ils sont nombreux — qui l'ont connu se souviendront de son amabilité. Dans nos réunions, il apportait toujours des avis judicieux.

A Mme Cheverry nous adressons notre affectueuse sympathie qu'elle partagera avec ses enfants.

9e semaine internationale de printemps à Grésillon 49150 BAUGÉ (4-9 Avril 1983)

Rencontre d'enfants essentiellement, cette Semaine a vu une collaboration exemplaire entre enfants, jeunes et adultes pour la réalisation d'un programme particulièrement riche.

Les matinées ont été occupées par des cours d'espéranto de trois niveaux et qui se sont déroulés de manière fort différente. Les petits, 8-10 ans avec M. Le Magadure, se sont surtout consacrés à converser simplement, à agir et à parler, à chanter. Les 11-14 ans pourraient dire qu'ils ont vécu une semaine japonaise, tellement ils ont été captivés par leur professeur, Mme Markarian, d'origine japonaise, qui les a initiés au calcul avec le boulier « soroban ». Kimie a d'ailleurs captivé toute la famille stagiaire réunie à la veillée lorsqu'elle a fait sa démonstration de soroban et de calcul rapide. Les « grands », jeunes et adultes, ont eu pour guide M. Raif Markarian, professeur de français, actuellement directeur d'un collège dans la banlieue de Londres à Shenfield ; avec lui, ils ont surtout pratiqué la langue en discutant de thèmes variés, tels que l'athlétisme, les villes d'Hennebont en Bretagne et de Jimena de la Frontera en Andalousie, l'espéranto ou l'anglais comme langue mondiale, la planche à voile... Les grands élèves se sont même essayés à la traduction de l'espéranto à l'anglais au cours de leur dernière séance.

Les après-midi ont été occupées à divers ateliers où les participants passaient à tour de rôle : origami ou pliage de papier (Kimie Markarian), décoration à l'aide de fils (Mady Tabel), danse, jeux, expression corporelle (Jenny Goddard). A 17 heures, Raif Markarian initiait la plupart des enfants à des danses folkloriques anglaises.

Chaque soir, tous les participants se retrouvaient à la veilllée ; les programmes étaient présentés sous forme d'émissions télévisées menées par les jeunes qui jouaient le rôle des journalistes : ceux-ci présentaient le bilan de la journée, interrogeaient leurs invités et annonçaient les différentes parties du programme : chants danses, sketches. Des diapositives nous ont montré les volcans et lacs d'Auvergne, d'autres le festival interceltique de Lorient : celles-ci ont donné l'occasion de parler de la langue, de la littérature et de la musique bretonnes.

Un panneau mural était à la disposition de ceux qui désiraient s'exprimer par le dessin ou le texte ; plusieurs artistes en herbe y ont exposé leurs œuvres, dont quelques-unes ont été retenues pour le journal de stage. Une élève y a aussi présenté un résumé sur les mégalithes et les Celtes, fruit de son travail de recherche dans une Histoire de la Bretagne. La visite à un élevage de chèvres et de sa fromagerie a été très appréciée et a aussi fait l'objet d'un compte rendu.

Au cours de la dernière veillée un participant adulte, M. Audibert, après avoir joué, en espéranto bien sûr, « L'Avocat », de J. Cossin, traduction de J. Thierry, a lu le poème de Pierre Selos « La voix des enfants ». Ce texte a permis aux responsables du stage de conclure en écho d'espoir que, « dans un monde où il y a tant de guerres, où les hommes torturent et tuent si facilement d'autres hommes, cette semaine est un modèle de collaboration, d'amitié et de compréhension internationales ».

Frédéric LE MAGADURE.

La kvara eldono

POR LA PRAKTIKANTOJ

« vigla lernolibro por la progresanto »

(katalogo de U.E.A.)

jus aperis

Por viaj kursoj, uzu ĝin

Prezo senŝanĝa : **25 FF**

speciala rabato por la grupoj ek de 10 ekzempleroj

kutima rabato por la Libro-Servoj

■

Mendoj : Esperanto-Domo - Libro-Servo, 49150 BAUGÉ (Francio)

Le prix de l'abonnement

à « **Kulturaj Kajeroj** »

est modifié

à partir du 1er janvier 1983

et passe à **60 francs** par an

Pour vos lectures
et vos cadeaux de fin d'année

offrez un chef-d'œuvre
de la littérature française
magistralement traduit

NORMANDAJ RAKONTOJ

de **Guy de Maupassant**

Traduit par Roland DUPUIS
Illustré par R. PINCHON

★

Prix : 36 francs

— **Rabais à partir de 3 exemplaires** —

NOS COURS PAR CORRESPONDANCE

Cours 1er degré. — 16 livrets illustrés qui permettent d'acquérir les bases essentielles de la langue.
Cours et corrections : 100,00 F.

Cours 2e degré. — 14 leçons présentées sous forme de feuillets. Permet d'acquérir une connaissance pratique de la langue.
Cours et corrections : 100,00 F.

Cours 3e degré. — Excellent entrainenement à un cours supérieur : versions thèmes, étude de textes.
Cours et corrections : 70,00 F.
Nous pouvons fournir les livres de cours à ceux qui ne les possèdent pas déjà. ★

Régler les cours par un chèque à part
C.C.P. : 1485 39 P Nantes

Les extraits de notre catalogue

UNU aù NUL

de Guy Marchand

LES BASES DU MONDIALISME

Prix de l'exemplaire : **15 francs**